# LA INFORMILO

Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al Unuiĝo Franca por ESPERANTO

Prezidanto : M. Cuéné, 59, rue des Trois-Châteaux - 68-COLMAR
Vic-prezidanto (junularaj aferoj) : R. KUBLER, 20, rue du Ruisseau-RODERN-68-THANN
Sekretario : J.P. COLLOT, 15, rue de Lavaux - 54 - LAXOU
Kasisto : J. CHAPELLIER, 109, avenue de la Malgrange -54-JARVILLE
CCP : 399-75 NANCY

N° 65 Oktobro 1970


## - COTISATIONS 1 9 7 1 -

Le trésorier de la Fédération de l'Est vous indique ci-dessous les taux des différentes cotisations 1971, qui sont sans changement par rapport à 1970.

Il est heureux de vous faire savoir que, malgré quelques défections, jusqu'à ce jour, 10.10.70, 124 samideanoj ont payé leur cotisation ; il espère qu'en 1971, ce nombre se trouvera en augmentation et d'avance il vous remercie pour le renouvellement de cette cotisation. Il vous serait reconnaissant d'indiquer, outre votre adresse complète, votre profession et votre date de naissance.

| | + de 21 ans | - de 21 ans |
|---|---|---|
| 1/- Membre adhérent (UFE & UEA) | 7,00 | 7,00 |
| 2°/- Membre titulaire (reçoit la revue "Franca-Esperantisto") | 31,00 | 16,00 |
| 3/- Membre individuel (reçoit "Franca Esperantisto et annuaire) | 54,00 | 27,50 |
| 4/- Membre individuel (Reçoit Franca Esperantisto, annuaire et revue mensuelle "Esperanto") | 77,00 | 50,50 |

(Pour les membres de Strasbourg, ajouter 5 fr pour le groupe). Tous les membres reçoivent la carte de membre, le feuillet de vignettes annuelles et La Informilo.

CHAPELLIER Jean (trésorier de la fédération de l'Est pour l'ESPERANTO)
109, avenue de la Malgrange - 54-JARVILLE
C.C.P. 399-75 NANCY

o
ooo
o

## VIVO EN STRASBURGO -

La dekvaran de Septembro komenciĝis l'aktiva vivo de nia Centro por la venonta periodo. Kiel kutime tiu unua kunveno okazis en la "boatejo" : dudeko da Strasburganoj kaj Oberkirkanoj penis por trovi lokon en tiu malgranda ejo. Kiel kutime, la pluvo invitis sin. Tiun jaron, nia kutima pluvo, akompanate de fulmotondro venis precipe por partopreni la kampfajron, ĉar efektive la antaŭaj kaj postaj tagoj estis daŭre sen nuboj. Kompreneble la aŭtoritato de la meteorologia-prezidanto suferis de tiu koincido.

Tamen la kolbasoj estis bongustaj kaj la fajro bruleĝis eĉ sub la pluvo. Nur unu kutimon ni forlasis ĉar kelkaj timis ofendi la nubojn per siaj kantoj. Dum oktobro estos nia vico rideti, kiam ni iros al Oberkirch gustumi la "novan vinon" : ĉar tiam okazos tiel forta forta nebulo ke eĉ la vino estos malklara en la glasoj.
Pri la labora parto de nia aktiveco, ni daŭrigos niajn semajnajn kunvenojn ĉiujn mardojn. Ni antaŭvidas du publikajn kursojn por komencantoj, gvidatajn kiel kutime de Sro ZIPFEL. La unua komenciĝos la 7an de oktobro. La unua artikolo jam aperis en bona loko ; eble la taĝurnaloj pli firme ol pasintjare helpos nin.

Sufiĉe longa artikolo pri Esperanto aperos en oktobro en la fak-ĵurnalo de l'aerarmeo en Entzheim.

Ni faros nian eblon por ke la novbakitaj membroj de la Centro estu inter ni kiel membroj de familio. Ni klopodos por ke ili kunvenu inter si almenaŭ fojon po monato. Ĉiuj malnovaj estas pretaj helpi ilin.

La grava afero de tiu jaro estos por ni, kun helpo de UFE, la enkonduko de Esperanto en du imponajn mediojn : Universitato kaj Europa Domo. Jam antaŭ la ferioj ni kolektis taŭgan materialon (kvankam en kvanto limigita) kaj por ĝi ni klopodos trafi ĝuste la celon se la ĉielo kompatos nin. Eble vi havos pli detalajn informojn en la vintra numero de La Informilo.

Delegitino de TEJO el Kolum petis de la Strasburganoj organizon de Seminario en 1971. Car ŝi petis nur la elekton de konferencoj kaj de loĝejo por la partoprenantoj, ni konsentis principe. Tamen ni profitos la okazon por altiri sur nin, rigardon de la publiko kaj de kelkaj eminentuloj.

Fine, kaj ankoraŭfoje ni petas de ĉiuj legantoj ke ili partoprenu aktive al kelkaj kunvenoj de siaj grupoj en la monato. Ili nepre devas tion fari, ĉar se ili agus alie, la kutimaj ĉeestantoj kaj aktivuloj, iom post iom baldaŭ laciĝos.

Laŭ mia opinio, ĉiu esperantisto tiun celon deziras trafi.

21.IX.70 F. KNECHT.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

JEUNES DE STRASBOURG

Vous avez appris l'Esperanto dans un des cours publics que nous organisons régulièrement depuis cinq ans déjà.

Vous avez fait un effort pour assister aux cours, pour suivre chaque leçon et pour rédiger des devoirs chaque semaine. Il ne faut pas que ces tâches restent vaines; vos progrès si minces soient-ils doivent être encouragés : vous devez maintenant pratiquer la langue.

Le Centre culturel d'Esperanto, dont vous êtes membres, organise des réunions chaque mardi à 20h30, soit au Palais de la Bière - Place Kléber (1er et 3è mardi) soit au siège de la place M. Mérian (2è et 4è mardi).

Nous vous demandons un effort minime: venir au Palais de la Bière le 1er mardi de chaque mois ; nous consacrerons cette soirée aux jeunes et aux débutants ; ce ne sera pas un cours magistral, mais une longue conversation. Nous parlerons de tout ce qui vous intéresse et le plus possible en Esperanto.

Plus tard, dans quelques mois, l'un d'entre vous prendra la responsabilité de réunir ses camarades jeunes. Vous serez entre vous, mais à tout moment vous pourrez faire appel aux anciens. Ils seront toujours prêts à vous aider. Ĝis baldaŭ.

La Komitato.

oooooooooooooooooooooooo

- eĥoj el Strasburgo - eĥoj el Strasburgo - eĥoj el Strasburgo - eĥoj el Strasburgo - eĥoj el

GEEDIZGO : Nia juna samideanino Fraŭlino Eliane STIEHR edziniĝis en Seltz la 1an de Aŭgusto. Plej feliĉajn dezirojn al la junaj geedzoj.

SPORTOJ - En iu tago de junio nia simpatia dojenino Sinjorino OEHRT iris por naĝi en la urba banejo. Malfeliĉe ŝi glitis en la supra koridoro, falis en la ŝtuparon kaj rompis al si la dekstran antaŭbrakon. Feliĉe ŝi devis resaniĝi antaŭ antaŭ ol vojaĝi al la strandoj de Sardio kaj Korsikujo. Malfeliĉe, dekon da tagoj antaŭ ol liberteniĝi, hepatito trafis ŝin.

Sed ĉio finiĝis agrable, ĉar meze de Septembro ŝi povis forlasi la klinikon tute resanigita. Ni deziras nun tute normalan vivon al nia kuraĝa amikino.

Spegulo.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

[illegible] :

Nia samideano Marcel BERGEROT en CHANTRAINE/EPINAL havis la doloron perdi sian patrinon fine de aŭgusto ; ŝi estis 90jara. Al Sro BERGEROT kaj al liaj gefratoj ni prezentas niajn elkorajn kondolencojn.

-=-=-=-=-=-=-=-=-

STRASBOURG - Novaj diplomitoj :

Ni disdonis diplomojn "A.I." al :

- Fino CHUNG Patricia
Sino HOLTZSCHERRER
Fino SAULAIS M.Martine
Fino SAULAIS M.Paule

Gratulojn al la sukcesintoj !

...

FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO

Cours d'Esperanto 1969-70

| Départt | Ville | Ecole ou Association | Pfofesseurs | Nbre élèves | Age | Durée fréquence |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Meurthe-et Moselle (54) | NANCY | Maison des Jeunes & de la Culture Cours par correspondance A=élémentaire B-supérieur | Responsable : M.COINOT Jean-Paul 15,rue de Lavaux-54-NANCY<br>Professeurs :<br>M.VIRY Pierre - Professeur 85,r.de la République 54-MALZEVILLE<br>M.DENIS Pol- Professeur 5,côte de Blamecourt 55- BAR-LE-DUC<br>M.OFFROY Gabriel- 5,rue Solvay 57-CHATEAU-SALINS<br>Mle JACQUOT Anna -EPINAL Vallon St-Antoine (88)<br>M.BERGEROT Marcel- 22,r.Varroy -88-EPINAL<br>M.GROSSMANN André 6,r.Dr Fréry-90-DANJOUTIN<br>M.ZIPFEL Frédéric 20,r.de Labroque 67-STRASBOURG<br>M.MARCEAU Jacques 14,r.de la Mine 57 - CREUTZWALD<br>M.FONDRILLON Pierre 28,r.Roger Bérin 54-ESSEY-LES-NANCY<br>Mme STENGEL Christiane 52,r.Roger Salengro 54 -TOMBLAINE<br>Mle COLLIN Monique 3,Place St-Rémy 54 - LUNEVILLE | A : 40<br>B : 6 | 12 à 70 ans | A = 6 mois<br>B = 2/3 ans |
| Meuse (55) | BAR-LE DUC | C.E.S. André Theuriet | M. DENIS Pol Professeur d'Allemand 5,Côte de Blamecourt 55 -BAR-LE-DUC | 15 | 12 à 16 | Club bi-mensuel |
| Bas-Rhin (67) | STRAS-BOURG | Ecole Primaire Schoepflin<br>Quai " | M.ZIPFEL Frédéric 20,r.de Labroque 67-STRASBOURG | 12<br>7 | 15 à 50 | 2 cours = Oct/Janvier Mars-Juin 1h/semaine 3 mois |
| Ht-Rhin (68) | COLMAR | Lycée Tech. Nation. mixte | M.CUENE Marcel 5[illegible],r.des Trois-Chateaux 68-COLMAR | 9 | 20 à 35 | 1h./semaine Octobre/Mai |
| | BUHL | Ecole de filles | Mle STUTZMANN Dir.Ecole retraitée r.de la Liberté- BUHL | 10 | 12 Classe de 7è | 1h./semaine |

...

| Départ^t | Ville | Eglise ou Association | Professeurs | Nbre élèves | Age | Durée fréquence |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Ht-Rhin suite | GUEB-WILLER | Ecole filles Ville-haute | Mle DORMERT<br>6,rue de l'Eglise<br>68-GUEBWILLER | 9 | 12<br>Classe<br>7ème | 1h./Semaine |
| | LAUTEN BACH | Ec.Annexe Schweighouse | M. DIPPERT<br>Directeur<br>d'Ecole | 14 | 11 à<br>13 | 1h./semaine |
| | LAUTEN BACH-ZELL | Ecole mixte de Sengern | Mme LABBE<br>Directrice<br>d'Ecole | 19 | 11 à<br>13 | 1h30/semaine |
| | MUL-HOUSE | Université Populaire Grand'rue | Mme HERVE Claude<br>35 A.rue d'Ensisheim<br>68 - WITTENHEIM | 7 | 18 à<br>60 | 1h30/semaine |

En nia Federacio, ni do kalkulas : 10 kursojn, kun 18 geprofesoroj kaj 148 gelernantoj.

Ni kompilis tiun tabelon laŭ informoj ricevitaj dum Junio sekve al enketo de UFE por komuniko al la Ministerio pri Nacia Edukado.

**Por ke ni povu pli frue aperigi la tabelon de la kursoj por la nova lernjaro, ni petas ĉiujn kursgvidantojn liveri la necesajn informojn al la Federacia Sekretariâ plej malfrue dum Januaro 1971.**

J.P. COLNOT

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

Ni varbu por taŭgaj sloganoj !

Nia amiko J.P.COLNOT en NANCY farigis specialan varb-stampilon, kiu konsistas en la jena slogano (varb-devizo) :

Parlez-vous
la langue internationale
Espéranto ?

Tiu stampilo estas uzebla por poŝtkartoj, kovertoj, en leteroj, sur pakaĵoj, kaj simile.

Estas tre rekomendinde, ke multaj samideanoj uzu la trafan sloganon de nia amiko COLNOT kiel eble plej larĝe, ne nur por stampiloj, sed ankaŭ por ĉiuspecaj varbiloj (presaĵoj, afiŝetoj por aŭto-vitroj, k.t.p.)

La aldono de informej-adreso (oficiala aŭ privata) estas nepre konsilinda, por doni maksimuman efikeblecon al tiu varb-maniero.

Bonvolu diskonigi tiun informon !

A. Lienhardt

N.B.- La ĉi supre menciita stampilo estas liverebla kontraŭ 14 frankoj, pagotaj al Sro Pierre Demonté - 4, Place Carnot - 54-NANCY - CCP 1208-77 NANCY (Oni skribu al li franclingve !).

LASTMINUTAJ INFORMOJ PRI KURSOJ.

STRASBOURG.- Kurso funkcias kun 10 novaj lernantoj.
COLMAR.- Sro CUENE anoncis kurson per kelkaj mallongaj komunikoj. Anoncis sin deko da lernantoj, kaj ĵurnalisto, kiu deziris intervjui Sron CUENE. La intervjuo daŭris 3 horojn ...! kaj la 15-an de oktobro aperis tutpaĝa artikolego pri ESPERANTO kaj la kurso en la loka gazeto " Dernières Nouvelles d'Alsace ", kun 2 bonegaj fotoj (D-ro ZAMENHOF kaj nia prezidanto) kaj reprodukto de la 1-a Esperanto-gazeto. Ni scivoleme atendas informojn pri la nuna nombro de lernantoj !...

J.-P. C.